
N° 05
1969

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

**Organo Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti**



IFEA

## 22-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "IFEF"

RIMINI (Italio) de sabato la 16-a ĝis vendredo la 22-a de majo 1970-a

------oooooOooooo------

Sub la aŭspicioj de F.I.S.A.I.C. kaj DOPOLAVORO FERROVIARIO.

KONSTANTA ADRESO: 22-a IFEF-KONGRESO,Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA
Post la 1-a de majo 1970-a oni devas adresi: ĉe D.L.F., Viale Regina Margherita, 109 = I-47037 RIMINI (Italio).

POŜTKONTO: N-ro 8/24094 de ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO, Via Donato Creti, 61 = I-40128 BOLOGNA (Italio).

BANKKONTO: C/C n-ro 02586 de DOPOLAVORO FERROVIARIO ĉe BANCA NAZIONALE DELLE COMUNICAZIONI, Via Rizzoli, 20 = I-40100 BOLOGNA (Italio).

INFORMA BULTENO

Kongresaj kotizoj: Kongresano: ĝis la 31-1-1970: Lit. 4500,- post la 31-1-1970 ĝis la 30-4-1970: Lit. 6000,-.

Familiano-Pensiulo-Junulo ĝis 21-jaroj: pagas, respektive, la duonon.

Simbola aliĝo: (Simpatianto kiu ne vizitas la Kongreson) minimume Lit.1000. Tuj post la kongreso li ricevos la kongresajn dokumentojn.

La kongreskotizo ne estas repagebla.

Loĝejoj: La hoteloj, tute apud la maro, estas de la sama kategorio: prezo por tranoktado kaj kompleta pensiono (sen trinkaĵoj): Lit.2000,- po persono po tage. (Por la tuta semajno de la 16-a vespere ĝis la 22-a de majo vespere: Lit.12.000,- ĉio enkalkulite escepte la trinkaĵoj). Nur tranoktado: Lit.1000,- po persono kaj nokto enkluzive matenmanĝo (nur tranoktado ne konsilinda).

Ĉambroperado: Prezo po lito: Lit.200,-. La ĉambroperado estas deviga.

Manĝoj: Ĉiu manĝo (sen trinkaĵo): Lit. 1000,- (ne konsilinda). La manĝoj okazos en la samaj hoteloj kie loĝos la kongresanoj.

Glumarkoj: La L.K.K. pretigis kvinkolorajn buntajn glumarkojn kiuj simboligas la kongresurbon, Esperanton kaj fervojon, pere de skizita velo sur maro kaj fluganta rado sur verda kvinpinta stelo.
La prezo estas, po folio de 4 ekzempleroj: 50 italaj liroj plus sendkosto. Mendu ilin tuj ĉe la adreso de la L.K.K.

Ekskursoj: Duontaga aŭtobusa ekskurso al SAN MARINO (Malnova Sendependa Malgranda Respubliko) antaŭvidita lundon la 18-an de majo posttagmeze: Prezo italaj liroj 800,-

Duontaga ekskurso per aŭtobuso al RAVENNA (Urbo de famaj mozajkoj kaj tiama ĉefurbo de Itala regno) antaŭvidita ĵaŭde la 21-an de majo matene: Prezo italaj liroj 1300,-

Tuttaga ekskurso per vagonaro al BOLOGNA, inkluzive aŭtobuso por viziti la urbon kaj la ĉirkaŭaĵojn, kaj tagmanĝon; antaŭvidita vendrede la 22-an de majo: Prezo italaj liroj 3000,-

Provizora programo:

Sabaton la 16-an de majo: Gazetara konferenco. Alveno de la Kongresanoj. Kunsido de la IFEF-Estraro kun LKK. Interkona vespero.

Dimanĉon la 17-an de majo: Diservo. Fotografado. SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO. Visito de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj. Folklora vespero.

Lundon la 18-an de majo: Laboroj de la Komitato kaj Komisionoj. Duontaga ekskurso al San Marino. Teatra vespero.

Mardon la 19-an de majo: Laboroj de la Komitato kaj Komisionoj. Piedpilka ludo. Fakprelegoj kaj filmoj. Junulara vespero.

Merkredon la 20-an de majo: Laborkunsidoj (Plena Asembleo). Filmoj kaj vizitoj al fervojaj instalaĵoj. Internacia Balo.

Ĵaŭdon la 21-an de majo: Duontaga ekskurso al Ravenna. Fermo de la Kongreso.

Vendredon la 22-an de majo: Tuttaga ekskurso per vagonaro al Bologna.

Kiel atingi Rimini: Rimini estas fervoja centro sur la linio Bologna-Ancona, atingebla, por tiuj kiuj venas de nordo, tra Bologna (km.112) aŭ Ferrara (km.124), kaj, por tiuj kiuj venas de sudo, tra Ancona (km.92). De Bologna oni povas atingi Rimini-n rekte, aŭ tra Castelbolognese-Ravenna (km.84+50).

Alveninte de Francio oni trairas la landlimon en Ventimiglia aŭ Modane; de Svislando en Iselle aŭ Chiasso; de Aŭstrio en Brennero aŭ S.Candido aŭ Tarvisio; fine de Jugoslavio en Poggioreale. Oni atingas Rimini-n:
De Ventimiglia tra Genova-Voghera-Piacenza-Bologna, aŭ rekte tra Genova-Bol.
De Modane tra Torino-Milano-Bologna, aŭ rekte tra Torino-Voghera-Piacenza-Bo
De Iselle tra Domodossola-Milano-Bologna. De Chiasso tra Milano-Bologna.
De Brennero kaj S.Candido tra Fortezza-Verona-Bologna.
De Tarvisio tra Udine-Venezia-Padova-Ferrara-Bologna.
De Poggioreale tra Trieste-Venezia-Padova-Ferrara-Bologna.
Post la tuttaga ekskurso al Bologna, oni povas atingi la sudan Italion de Bologna tra Firenze-Roma k.c. aŭ rehejmvojaĝi, aŭ reveni al Rimini kaj daŭrigi al suda Italio tra Ancona-Roma k.c. aŭ tra Ancona-Bari k.c.

## Iom pri la kongresurbo

Rimini, kvankam urbo riĉa je historio, pri kio atestas elstaraj monumentoj, estas nuntempe fama precipe pro sia strando, certe la plej bela en Eŭropo pro la kvalito de ĝia sablo, pura kaj ora, ĝia longo (15 km) kaj ĝia larĝo (100 m). Ĉiujn sportojn oni povas ĉi tie disvolvi: ĉevalrajdadon, skermon, tenison, mar--skiadon, motor kaj velsporton, naĝadon, bokson, ktp. Ĉefe por infanoj tiu ĉi strando estas senriska: la mola malalta fundo permesas eniri en la akvon sen danĝero. Oni kreis ankaŭ specialan centron por helpo.

Belegaj magazenoj de ceramikaĵoj, vestaĵoj kaj ornamaĵoj altiras multnombrajn klientojn, dum la manĝaĵ-vendejoj, ĉiutage provizitaj de prosperaj ĉirkaŭaĵoj, garantias al la gasto sanajn kaj sincerajn nutraĵojn. Plue aŭtobusa kaj fadenbusa unuaranga-servo kunligas la diversajn partojn de la urbo kaj la ĉirkaŭaĵojn.

## INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO 1970

La Internacia Fervojista skisemajno okazos de la 31-1 ĝis la 7-2-1970 en Vràtna-valo en Ĉeĥoslovakio. Je dispono de la partoprenontoj estos la montardomo Chata pod Sokolìm.

Duontaga ekskurso al urbo Žilina, sidejo de trafika altlernejo, estas antaŭvidata. Por tiuj kiuj deziras partopreni, post I.F.E.S., dutagan ekskurson (lundon kaj mardon) al Plzen' por viziti la famajn uzinojn Skoda-n kaj la mondfaman bierfabrikon Pilsner oni aranĝos loĝigon en hotelo aŭ ĉe esperantistoj, laŭ indikoj en la aliĝilo. Tiu ĉi ekskurso ne estas enkalkulita en la prezo de I.F.E.S.

Aliĝkotizo estas 24 us.dol.(aŭ egalvaloro) por 8 tagoj aŭ 21 por 7 tagoj.

Atentu: Deviga estas la ŝanĝo de 3 us.dol. po tage. Postulu de la Banko, kvitancon de la farita aliĝpago, kaj prezentu ĝin kiam vi petos la vizon (eventuale ĉe la Ĉeĥoslovaka landlimo). Mendu kaj sendu la aliĝilon al jena adreso: Ladislav Kovàř, SD VŠD, Hliny bl.VIII/403 Žilina. Sendu la aliĝkotizon al tiu ĉi adreso: Ladislav Làni, Pod vrchem 59 Plzen' 4.

Limdato por aliĝo estas 30-11-1969.

## NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

### Korte Konsilisto H U G O S T E I N E R

Li mortis en Vieno la 1-an de aŭgusto 1969-a en la aĝo de 92 jaroj. Li estis la fondinto kaj Honor-Prezidanto de la Internacia Esperanto Muzeo en Vieno, Honora Membro de U.E.A., Honora Prezidanto de Aŭstria E-Movado kaj de Aŭstria Federacio de Fervojistoj-Esperantistoj, kaj honormembro de multaj organizoj. Li posedis plurajn, gravajn, ŝtatajn kaj eksterlandajn dekoraciojn kaj distingojn. Hugo Steiner esperantiĝis en 1911 kaj renkontis D-ron Zamenhof en Krakovo. En 1927 li fondis I.E.M.W., kiu nun troviĝas en unu el la plej belaj palacoj en la centro de Vieno kaj estas subvenciata de la ŝtato.

La ideo de Esperanto perdas kun K.K.Steiner sendube iun de siaj plej fidelaj kaj eminentaj advokatoj. Li postlasas gravan taskon al siaj kunlaborantoj.